Kunlaboro inter la Oficejo de UN en Ĝenevo (UNOG) kaj la Konferenco de Neregistaraj Organizoj en Kunlabora Rilato kun UN (CoNGO)

Konversacio inter Tatiana Volovaya, Ĝenerala Direktoro de la Oficejo de UN en Ĝenevo (UNOG) kaj Liberato Bautista, Prezidanto de la Konferenco de Neregistaraj Organizoj en Kunlabora Rilato kun UN (CoNGO), pri rilatoj inter neregistaraj organizoj (NROj) kaj UN

La konversacio okazis la 8-an de aprilo 2021 kaj estis organizita de CoNGO por faciligi la kontaktojn inter reprezentantoj de NROj en Ĝenevo kaj por pli bone koni la prioritatojn kaj celojn de la Ĝenerala Direktoro la UN-Centro en Ĝenevo.

Kunordigis ĝin Lidiya Grigoreva, direktoro de la oficejo por kontaktoj kun NROj ĉe UNOG. Grigoreva tuj atentigis, ke "pro teknikaj kialoj" oni ne povas liveri interpretadon. Tamen, ne estis klara la koncerna teknika malfacilaĵo.

Inter la aparte interesaj komentoj de la Ĝenerala Direktoro estis la jenaj:

1. Gravas kunlabori kun NROj eĉ en la nunaj malfacilaj cirkonstancoj. Dum la pasinta jaro okazis per UNOG 4000 diversaj kunsidoj, kaj la Homrajta Konsilio (kies sidejo estas ĉe UNOG) "plenumis 100% de siaj aktivecoj".

2. Ŝiaj ĉefaj prioritatoj en 2021:

- **Daŭrigi kaj restarigi la centran rolon de la Celoj por Daŭripova Evoluigo;**
- **Paco kaj malarmado (okazos konferenco pri malarmado post kelkaj monatoj);**
- **Homaj rajtoj;**
- **Seksa (genra) egaleco.**

3. La valoro de hibridaj (t.e. parte ĉeestaj, parte virtualaj) kunvenoj: Ili havas multajn avantaĝojn, precipe por izolitaj elementoj (ekzemple tute malgrandaj insulaj ŝtatoj) kaj por inkluzivo de la veraj kaj pli radikitaj fakuloj (ne simple tiuj kiuj povas vojaĝi al Ĝenevo), tiel ebligante partoprenon de homoj proksimaj al la publika opinio.

4. Ĉefaj defioj en 2021:
La Ĝenerala Sekretario jam emfazis (kaj s-ino Volovaya substrekis) kvar defiojn:

- **Klimato;**
- **Teknologioj;**
- **Geopolitikaj strečitecoj;**
- **Tutmonda malfido.**

S-ino Volovaya aldonis, ke "ordinaraj civitanoj volas engaĝiĝi", kaj teknologio igas tion ĉiam pli farebla. Ŝi aparte emfazis ke ŝi parolas ne tiom kiel UN-ano, kiom kiel iama

ĵurnalisto: “Ni bezonas efikajn formojn de dialogo”. Tamen, ŝi diris: UN estas interregistara organizo, kaj sekve devas okazi dialogo precipe je la nacia nivelo. NROj havu fizikan aliron al UN same kiel registaroj – sed politika aliro venu unuavice tra la registaroj.

Priskribo de la dialogo inter Liberato Bautista (LB) kaj la Ĝen. Dir. Tatiana Volovaya (TV):

LB: Emfazis, ke la membroj de CoNGO estas tre variaj: grandaj kaj malgrandaj organizoj, kun plej diversaj celoj. Ofte, tamen, estas NROj kiuj per sia agitado kaj insisto iniciatas agadon, ekzemple ĉirkaŭ la demando de surteraj eksplodiloj.

TV: Jes, kaj ĝuste pro tio gravas labori kun la membraj ŝtatoj.

LB: Kiuj estas via plej granda entuziasmo kaj via plej granda zorgo?

TV: Entuziasmo: la Celoj pro Daŭripova Evoluigo. Zorgo: Same la Celoj pri Daŭripova Evoluigo, ke la laboro daŭru post 2030. La Celoj ja ne estas nur ekonomiaj indikiloj, sed daŭrantaj prioritatoj kaj juraj demandoj.

TV: NROj povas helpi al UN per engaĝo de ordinaraj civitanoj. La nombro de akredititaj NROj daŭre pligrandiĝas: 790 antaŭ kvin jaroj, 1100 nun.

LB: Emfazis, ke CoNGO estas “konferenco” de NROj: ĝi ekzistas por faciligi dialogon kaj komunikadon kaj por defendi la rajtojn de NROj laŭ EKOSOK-Rezolucio 1996/31.

Sekvis demandoj kaj respondoj de la publiko, kunordigataj de la vicprezidanto de CoNGO Cyril Ritchie kaj aktiva CoNGO-membro Sheila Bordier. Ili abundis. Ili tuŝis i.a. la t.n. “digitan dividon”: kvankam pli kaj pli da homoj havas aliron al Interreto, grandegaj nombroj da homoj ne havas tian aliron.

Kial limigoj al la partopreno de NROj en la laboro de la Komisiono pri Homaj Rajtoj? Respondo: la Komisiono agas sendepende de UNOG, kiu ne faras la kondiĉojn. NROj lobiu la membrajn ŝtatojn.

Inter la amasaj demandoj estis unu de mi mem, kiu tamen ne ricevis konsideron:
“Vi pravas, s-ino Ĝenerala Direktorino: tiu ĉi virtuala kunveno ja ebligas pli da engaĝo de naciaj kaj lokaj agantoj – sed grandigas lingvajn malfacilaĵojn. Kion UNOG povas fari por igi UN aŭskulti la voĉojn de ordinaraj homoj en ties diversaj lingvoj, kaj tion fari eĉ post la pandemio?”

Responde al alia demando, Tatiana Volovaya tamen atentigis, ke UNOG nun kunordigas preparon de platformo kiu ebligos utiligon de interpretado en konferencado – unu el la ĉefaj mankoj de la nuna sistemo de distanca kunvena partoprenado.

Fina rimarko de Liberato Bautista: nia celo estas “Plifortigi esperon, malfortigi timon”.

Raportis: Humphrey Tonkin